Dankon al la samideaninoj, kiuj rikoltis informojn por prepari la kongreson . Nun ni esploras la eblecon organizi ekspozicion pri esperanto dimanĉe ; helpoproponoj pri informado, instalado kaj prizorgado de la ekspozicio,ktp, estas bonvenaj .

**PERPIGNAN**

La 8an de januaro nia Kultura Centro festis Epifanion, ni servis aperitivon .Amika etoso .
Plia kurso unuagrada estas gvidata de S-ro Renato Figueira, ĉiumarde inter la 16a kaj 17a horo .
Ni aktive preparas lumbildan prezenton de la regiono por la fervojista kongreso okazonta en Port-Vendres en marto (vidu detalojn ĉi-poste kaj aliĝilon sur la sekvanta paĝo) .

---

*Anonco aperinta en "L'Indépendant" de la 7a de januaro, en la rubriko "leteroj de la legantoj":*

"Appel aux espérantistes"

**M. Christian Pinard de Prades "recherche" :** Découverte l'été dernier, j'étudie depuis avec beaucoup d'intérêt cette langue plus que centenaire : l'espéranto. Si l'apprentissage de l'espéranto est très facile à l'aide des cours gratuits dispensés via Internet, la pratique de l'oral reste toutefois problématique : le premier club recensé se trouve à Béziers ! Je lance donc ici un appel vers les personnes désireuses d'apprendre l'espéranto et vers les espérantistes confirmés du Conflent afin de se retrouver, dans le but de pratiquer notre "internacia lingvo". Ceci pourrait se faire soit dans le cadre de réunions ou de groupes de travail, soit, suivant en cela l'exemple d'Espéranto-France, autour d'un bon repas au restaurant ! Toutes les idées seront les bienvenues. J'invite les personnes intéressées à me contacter à mon domicile : Christian Pinard, 23 rue de l'hospice 66500 Prades.

*Kompreneble, ni informis S-ron Pinard kaj la gazeton, ke ekzistas esperantistoj en la regiono, ankaŭ en Perpignan ekzemple kaj ke dum la jaro ne mankas eblecoj praktiki hejme (perrete) proksime aŭ malproksime .*

## FERVOJISTA KONGRESO EN PORT-VENDRES (P-O) : 9-14 MARTO 2002

## NACIA KONGRESO DE FFEA

*Malfermata al ne-fervojistoj ; daŭro de restado elektebla*
*Adreso de la kongresejo : Maison du CCE/SNCF "La Voile d'or"*
*2 Quai de la République 66660 Port-Vendres Tel : 04 68 82 22 49*

### PROGRAMO

**Sabaton, la 9an :** Posttagmeze : akcepto en la stacidomo de Port-Vendres (14h30 ĝis 17h30).
Piede al la apuda kongresejo - valizoj transportotaj aŭtomobile .
Vespere : andaluzaj kaj katalunaj dancoj

**Dimanĉon, la 10an :** Matene : Ĝenerala kunveno / Posttagmeze : ekskurso al keloj Rocbère /
Vespere : Festmanĝo . Katalunaj kantoj kaj andaluza popolmuziko .

**Lundon, la 11an :** Matene : Kunveno de la perkorespondaj kursgvidantoj kaj interesiĝantoj .
Prelego de D-ro Romano Bolognesi / Unuagrada ekzameno .
Posttagmeze : Ŝipekskurso (Port-Vendres-Collioure-Banyuls-Port-Vendres)
Vespere : lumbildoj pri la kataluna regiono, komentotaj en esperanto .

**Mardon, la 12an :** Tuttaga ekskurso laŭlonge de la "Costa Brava", kun parto per ŝipo de Rosas ĝis Cadaques kaj revene .
Vespere : Spektaklo de parodiaj muzikaj klaŭnoj .

**Merkredon, la 13an :** Tuttaga ekskurso kun vizito de Orienta Pirenea regiono (Fortikaĵoj de Villefranche-de-Conflent, de Mont-Louis, de la suna forno de Odeillo) kaj reveno per la "Flava trajno".

**Ĵaŭdon, la 14an :** Forveturo de la kongresanoj .
Libera tempo je la dispono de tiuj, kiuj decidos resti <u>ĝis sabato, la 16a, matene</u> .

### PRI LA RESTADO

La prezoj estas indikataj por unu persono en kompleta pensiono (manĝoj kun trinkaĵo, festmanĝo, tranoktadoj) de sabato la 9a de marto vespere ĝis ĵaŭdo, la 14a de marto matene, inkluzive de la ekskursoj kaj aliĝkotizo (eblecoj 1 ĝis 4) . Por la eblecoj 5 kaj 6 aldoniĝas la tranoktadoj kun matenmanĝoj de ĵaŭdo ĝis sabato matene (aliaj manĝoj elektotaj de la kongresanoj en restoracioj) .
Tualettukoj ne estos provizataj en la dormoĉambroj .
Por ĉiuj eblecoj **antaŭpago de 116 €** (760 F) **ĝis la 1a de februaro 2002** (krom por eksterlandanoj)

| | En dulita ĉambro | en unulita ĉambro |
|---|---|---|
| Ebleco 1 : de sabato vespere ĝis lundo posttagmeze | 116 € | 126 € |
| Ebleco 2 : de sabato vespere ĝis mardo posttagmeze | 170 € | 180 € |
| Ebleco 3 : de sabato vespere ĝis merkredo posttagmeze | 240 € | 253 € |
| Ebleco 4 : de sabato vespere ĝis ĵaŭdo matene (post matenmanĝo) | 295 € | 312 € |
| Ebleco 5 : de sabato vespere ĝis vendredo matene | 311 € | 330 € |
| Ebleco 6 : de sabato vespere ĝis sabato matene | 327 € | 347 € |

✂ *Port-Vendres* - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## ALIĜILO / BULLETIN D'ADHESION

**sendota kun antaŭpago de 116 €, krom por eksterlandanoj (eblas ankaŭ pagi la tuton je la enskribiĝo) antaŭ la 1a de februaro 2002** / à envoyer avec un acompte de 116 €, sauf pour les étrangers (il est possible de payer aussi la totalité lors de l'inscription) avant le 1° février

**al / à Michel Lafosse - 6 Impasse Gabriel Voisin -FR 31130 Balma**

**Familia nomo** / Nom : ........................................... **Persona nomo** / prénom : ..................

**Kompleta adreso** / adresse complète : ..........................................................................

...................................................................................................

**Mi estos akompanata de** / je serai accompagné(e) par .............................................

**Restado elektita** / séjour choisi : **Ebleco** / possibilité n° ..... **Tarifo** / prix ..............€

**Por la nefervojistoj aldoniĝas la ekskurso en la flava trajno : 9 €,60** ..............€

Supplément de 9,60 € pour les non-cheminots (excursion en "Train jaune")

**Sumo** / Total : ..............€

**Mi alvenos en la stacidomo de Port-Vendres la..........de marto je la..............horo .**

J'arriverai à la gare de Port-Vendres le........mars à .......h.....

**Mi forveturos la .............. je la ..............** / Je partirai le .................... à ........h.........

**Mi deziras loĝi en unulita ĉambro O**

**en dulita ĉambro O kun S-ro (ino) ..................**

Je souhaite être en chambre à un lit / en chambre à deux lits avec ...

**Mi kunsendas ĉekon de .....€** (chèque joint de .........€)

**je la nomo de** (à l'ordre de) :

**Les Cheminots Toulousains pour l'Espéranto pĉk/CCP 0778 991 W Toulouse .**

**Tiun sumon oni repagos al mi, se mi rezignos mian partoprenon antaŭ la 9a de februaro 2002**

Cette somme me sera remboursée si j'annule ma participation avant le 9 février 2002 .

**Se vi deziras vegetaran dieton, bonvolu kruci** / faire une croix pour un menu végétarien **O**

**Dato** / date : .................. **Subskribo** / signature :............................

✂ - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## RENDEVUOJ

Ĉiutage okazas E°-renkonto . Se vi preferas la sunon, vi povas elekti inter **Aŭstralio** (nacia kongreso 5-18 I) aŭ **Kubon** (6-9 III); se vi preferas la montaron, renkonto estas pro--gramita en **Nepalo** (26/2-8/3). UFE organizas karavanon al la UK de Fortaleza (**Brazilo**) en Aŭgusto .

Pli proksime estas notindaj :

-IASE-3 en Marly le Roy (78) 8-10 II (preparado de instru--materialoj),

-E°-semajnfino kun la fama muzikbando Kajto en Bordozo (16-17 II). Karavano el Tuluzo

*Ĉi-poste kelkaj eventoj jam anoncitaj en somero :*

### *julio*

01-07: **75-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda,** Alicante, Hispanio (SAT, 67 ave. Gambetta, FR-75020 Paris; ☎+33/1/47-97-87-05; ⎙47-97-71-90; ✉satesper@noos.fr, http://www.multimania.com/satesperanto/kongresoj/kongreso2002/Alicante2002.html)

01-07: **12-a Internacia E-Kongreso,** Rīga, Latvio (Māra Timermane, Valdemāra iela 145/1-32, Rīga LV-1013; ☎+371/7/361-395; ✉mtimermane@hotmail.com; temo: "Internacia kulturo en Baltaj landoj")

01-07: **Renkontiĝo de Europa Junularo** apud Kijivo, Ukrainio (Mikaelo Lineckij, p. k. 91, UA-04201 Kijiv-201, ☎+38/044/432-07-43; ✉rejo@uafree.net, http://www.esperanto.kiev.ua/rejo.htm)

05-07: **61-a Hispana E-Kongreso,** Alicante, Hispanio (✉augustocasquero@infonegocio.com)

06 jul. - 17 aŭg.: **Diversaj staĝoj,** Grésillon, Francio (Château, FR-49150 Baugé; ☎+33/2/41-89-10-34; ✉esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr, http://greziljono.kastelo.free.fr)

07-14: **38-aj Baltiaj E-Tagoj,** Rīga, Latvio (Organiza Komitato, p.k. 150, LV-1050, Rīga; ☎+371/727-61-88, 640-71-74; ✉esperolat@e-apollo.lv)

08-26: **Nord-Amerika Somera Kursaro,** Brattleboro, Vermonto, Usono (Lucy Harmon, 2389 Thackeray Dr, Oakland CA 94611; ☎+1/510/531-83-93; ⎙531-01-52; ✉lusiharmon@aol.com)

14-21: **4-a Kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj,** Janské Lazné, Ĉeĥio (AEH, Na Okrouhlíku 953/21, CZ-53003 Pardubice, ✉josef.hron@vakpce.cz)

20-26: **Internacia E-Konferenco** de OSIEK, Loveno, Belgio ("Esperanto 3000", Rue R. Ménada 44 BE-1320 Hamme-Mille; ☎+32/10/860-112; ✉esperanto3000@esperanto.be, http://www.geocities.com/esperanto3000/IEK2002.htm; temo: "Scienco kaj socio")

20-27: **55-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista,** Kroměříž, Ĉeĥio (Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Pencice; ✉msvacek@iol.cz, http://www.ikue.org/kong2002/kong2002.html)

21-28: **58-a Internacia Junulara Kongreso,** Pato Branco, Brazilo (TEJO, p/a CO de UEA, vidu kolofonon)

25-31: **15-a Internacia Junulara Semajno,** Székesfehérvár, Hungario (HEJ, pk. 87, HU-1675 Budapest; ☎/⎙+36/1/282-88-85; ✉hej@math.bme.hu, http://www.esperanto.hu/hej/)

26 jul. - 02 aŭg.: **18-a Internacia Simpozio pri E-Turismo,** kun studadsesio de AIS pri ekologio en Amazonio, ŝipvojaĝo Manaus-Belém, Brazilo (Monda Turismo, vidu 3 feb.)

*87-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Fortaleza, Brazilo, 03-10 aŭg. 2002*

### *aŭgusto*

03-10: **87-a Universala Kongreso de Esperanto,** Fortaleza, Brazilo (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Diverseco: ŝanco, ne minaco")

10-20: **Somera E-lernejo** kun trinivelaj kursoj, Rečići, Bosnio kaj Hercegovino (E-Ligo de Serba Resp., P.K. 335, BA-78000, Banja Luka; ✉elrs@blic.net)

23-26: **3-a Azia Kongreso de E-o,** kun sesio de AIS, Seulo, Koreio (Korea E-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul - 121-703; ☎+82/2/717-69-74; ⎙717-69-75; ✉keast@soback.kornet21.net)

23-28: **5-a Eŭrop-Unia E-Kongreso,** Verono, Italio (Verona E-Grupo, C. P. 1616, IT-37100 Verona; ✉esperantoverona@adriacom.it; temo: "Efektiva lingva egaleco: rajto de la eŭropanoj")

*5-A EŬROP-UNIA E-KONGRESO, Verono, Italio 23-28 aŭg. 2002*

VERONA EUROPO 2002

## DIVERSAĴOJ

### CIFEROJ

-NUN, retejo de la Sveda E°federacio registris en 200 **1 037 966 vizitojn**, la plej alta kvanto depost 1996 .

-Laŭ la listo de G.Pirlot, fine de 2001, **93 eŭropaj parlamentanoj** (14,86 % de 626 parlamentanoj) estas diversgrade favoraj al E°, 12 el la 15 el Irlando (1a loko) kaj nur 1 el la 31 el Nederlando; Francio estas en la kvara loko (15 el 87)

-La freŝe aperinta "Retadre--saro de Esperantistoj" enhavas **3200 adresojn** de 2168 personoj el 95 landoj, 741 retpaĝadresojn kaj retinformojn pri 580 landaj/lokaj organizoj/gaze--toj kaj 77 internaciaj.Elŝutu: http://home.wxs.nl/-lide-esperanto-adresaro_txt.zip

### BONE☺ MALBONE☹

Antaŭ nelonge la lingvisto Claude Hagège deklaris en Brazilo, ke E° estas iluzio k. ke la serĉado de komuna ling--vo estas esence ideologia . Duonsurprizo pri li, tamen ni ne forgesu, ke li estas ankaŭ konsilanto de ministro J. Lang . Tiu lasta sciigis, ke la ĝeneraligo de la instrua--do de fremda lingvo en la bazlernejo estas prokrastita de 2005 ĝis 2008 .

"Fraterniphonie", pri kiu ni raportis detale en la lasta SF denove mencias pozitive esperanton kun kontribuoj de M. Vidal, G. Pirlot, T.Saladin . Eble la aserto, laŭ kiu 95% de la E°-radikoj estas komprenataj "sen peno" de la Francoj kaj 90% de la Angloj, estas iom troiga . dekstre : desegnaĵo el la bulteno de "Fraterniphonie".

➢

## ALVOKOJ

-Helpantoj estas petataj por funkciigi Greziljonon (**Grésillon**), la konatan E°-centron, dum la someraj monatoj .


-"Take-La Domo" serĉas **staĝlokojn** por du junaj diplomitoj (teknika abituro) el Malagasio, parolantaj la malagasan, la francan, esperanton kaj iom da angla . Studoj : domkonstruado kaj mekanika fabrikado .

-**"Courrier de l'Unesco"**, eldonita en pluraj lingvoj, ĉesos aperi. Anstataŭe aperos sesmonata senpaga publikaĵo . Ĉu ne bona okazo por peti esperantan version, kiu povus esti legata en la tuta mondo ? Adresoj : Courrier de l'Unesco,31 Rue François Bonvin 75732 Paris Cedex 15/ Rete: http://www.unesco.org/courier courrier.unesco@unesco.org / redaction.courrier@unesco.org

-La E°-societo de **Kebekio** (Kanado) ekis kampanjon, por ke Radio Kanada Internacia elsendu rete en E° . RKI jam elsendas en la angla, araba, franca, hispana, kantona, mandarena,ukraina, rusa . Petletero estas subskribebla ĉe http://www.chez.com/rki Informoj esperanto@sympatico.ca ĉe N. Fleury (UEA-jarlibro)

-Kampanjo de Sat/Sat-Amikaro por la **liberigo de kvar rusaj gejunuloj** . Pro polica mahinacio, kvar gejunuloj estis malliberigitaj en Moskvo kaj estis mistraktataj . Ilia krimo estas, ke ili helpas al senhavuloj, al tiuj, kiuj falis en dekadencon, por ilia restarigo. Ili riskas 20-jaran malliberigon. La informo aperis en "Sennaciulo",organo de Sat kaj en "Courrier International". Sat eldonis subtenan poŝtkarton, kiun oni povas mendi kvante (po 10,50,100 ekzempleroj).
Komplementaj informoj ĉe http://www.esperanto-sat.info .

-OFAJ : office franco-allemand pour la jeunesse lanĉas kampanjon : "**Parlons européen** !". Temas pri la defendo de plurlingvismo kaj de plurkultureco, kun la espero, ke la germana ne plu suferos pro la superregado de la angla. Ĉu ni informu ilin, ke la plej bona defendo de plurlingvismo estas neŭtrala lingvo ?




## SIGLOJ

UEA = Universala E°-asocio TEJO = Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (sekcio de UEA) UFE = Unuiĝo Franca por Esperanto (aù France-Esperanto) JEFO = Junulara Esperantista Franca Organizo (Espéranto Jeunes) IJK = Internacia Junulara Kongreso UK = Universala Kongreso .
En 1998 UFE organizis en Montpellier la UK por UEA .
En 2001 JEFO organizis en Strasburgo la IJK por TEJO . Ĉu en ordo ? Nun vi legos la ateston de juna partopreninto, ĝi aperis en la lasta bulteno de Jefo kaj raportas pri la unuafoja IJK de Tejo . Uf !
Bonan legadon ! Eble vi decidos poste partopreni vian unuan IJK aù UK !

### "Mia unua esperanto-arangxo "

Saluton al ĉiuj !

Vi ne konas min, tamen mi partoprenis la IJK-n en Strasburgo, eĉ se mi ne aperas sur la listo de la partoprenantoj ... fakte oni povas diri, ke mi estas kaŝitulo ("clandestin"), ĉar mi eĉ ne pagis mian kotizon !
Bone, mi ege kontentas, ĉar malgraŭ mia juna aĝo mi jam vivis mian unuan esperanto-aranĝon, kaj mi volis rakonti al vi, kiel mi travivis ĝin !
Fakte mi alvenis nur la duan tagon vespere en Strasburgo, kun mia patrino. Iomete pro mi, ni alvenis tiom malfrue, ĉar mi malsanigis panjon ...
Ah, la alveno en aranĝo estas io ! Multe da homoj brakumis mian patrinon... do mi estis ankaŭ iomete en la festo, eĉ se la homoj ne sciis, ke mi ankaŭ ĉeestis !
Poste, ni retrovis nin en loko multe pli trankvila. Estis dolĉa muziko kaj la homoj parolis mallaŭte. Odoris teon, mi sentis min bone, eĉ se de tempo al tempo, la bruo de monero kiu falis en la kaso vekis min ...
La semajno pasis tre rapide, sed mi tamen povis rimarki multe da aĵoj ...
Estis tiu stranga specifo da homoj kiuj kuris ĉiam en ĉiujn direktojn kaj komunikis per (portebla sonaparato). Panjo klarigis al mi, ke oni nomas ilin LKK-anoj, kaj ke se ni estis ĉi-tie, estis dank'al ili ...
Estis ĉiam multe da muziko kaj da kantoj. Aparte unu kanton mi multfoje aŭdis, ĝi estis en la hispana, kaj kiam ĝi pasis, ĉiam mi povis aŭdi la bruojn de kisoj samtempe, estis amuze.
Ni ankaŭ biciklis. Estis varme, sed mi ne tro sentis la varmecon ĉar mi estis en klimatiza ejo dum la promenado.
Kaj estis multe da ridoj, da bonhumoro, da babiladoj dum la tuta semajno...
Panjo ne multe dormis ! Kiam ni foriris, mi aŭdis multe da homoj paroli al panjo pri alia aranĝo : la IS. Mi kriis, ke mi volis iri tien, sed panjo ne aŭskultis min, kaj respondis, ke ŝi ne ĉeestos. Poste, ŝi klarigis al mi, ke mi estis tro juna, kaj ke ŝi estos tro peza tiam por fari tiom grandan vojaĝon. Mi protestis, sed ŝi volis scii nenion. Estas bedaŭrinda, ĉar mi havis mesaĝon por la partoprenantoj ... Eble vi povas transdoni ĝin al ili ? Jen : mi ŝatus havi geamikojn samaĝajn kiel mi, kiam mi revenos en Esperantion. Do, tio, kio estus bonege estus, ke vi dum IS duopumu por fabriki bebojn ... Nia aĝdiferenco estus nur kelkaj monatoj, estus ege bone, ĉu ne ?
Mi ne povas subskribi (ĉar mi ne havas nomon ankoraŭ), sed mi tamen povas doni al vi mian adreson : mi loĝas en la ventro de mia patrino, Essendilène.
Sed atentu, tiu adreso validos nur ĝis marto ! Ĝis baldaŭ !




*MERCI à Essendilène qui a aidé l'équipe d'organisation. Entre autres, et toujours avec le sourire, elle a pointé les cartes de repas, commençé le "gufujo", organisé une promenade en vélo.*

**BONDEZIROJN DE SUKCESO** al Ludivine Delnatte, "junuldungitino" ekde septembro por UFE, JEFO kaj la Federacio de Ile de France .
Ludivine loĝis pli frue en Béziers kaj Montpellier...



Sukceson ni ankaù deziras al la du novaj respondeculoj ĉe UEA . La estraro nomumis Aganta Ĝenerala Direktoro por la jaro 2002a Trevor Steele kaj redaktoro de la revuo "Esperanto" Stano Marĉek . Ambaù estas jam konataj de esperantistoj . Trevor Steele estas aùstraliano, instruisto kaj verkisto . Stano Marĉek estas 48jara slovako, kiu jam redaktis plurajn revuojn . Ambaù nomumu--moj estas por la transira jaro 2002-a . Oni pluserĉas kandidatojn por pli longtempaj kontraktoj .

## IOM DA HISTORIO


### PIONIROJ DE LA EŬROPA VALUTO / PIONNIERS DE LA MONNAIE EUROPÉENNE

Promeuro (1, Avenue de la Gare, LU 1611 Luxembourg) est une association des citoyens européens pour la promotion de la monnaie européenne. Promeuro a fait des recherches pour découvrir le premier appel de citoyens pour une monnaie unique . Les premières traces montrent qu'il émanait du milieu espérantiste . Déjà en 1915 Zamenhof avait écrit dans son "Appel aux diplomates" que ce serait mieux s'il y avait un jour des "Etats-Unis d'Europe" . Avant la première guerre mondiale, des espérantistes avaient fait des propositions pour une monnaie internationale . Ci-joint une carte postale éditée en Roumanie et adressée à un espérantiste français (envoyée d'Espagne le 13/9/34).

Traduction du texte :

"Européens ! 1 . Envers et contre tout, ayez foi en l'Union Européenne. 2. Lors d'élections nationales, ne votez que pour un parti qui milite en faveur de la création d'une zone économique européenne unifiée. 3. Propagez l'idée de la création d'un Parlement commun aux parlements nationaux européens 4. Exigez la constitution d'une armée commune européenne, ainsi que l'introduction d'une monnaie européenne unique . 5. Exigez un statut d'autonomie pour les Etats, les provinces et les villes dans le cadre des Etats-Unis d'Europe . 6. Etudiez dans un esprit européen . 7. Respectez la nationalité d'autrui 8. Luttez pour la débureaucratisation de l'économie ( sa dénationalisation et sa démonopolisation ) . 9.Luttez pour des lois et des institutions qui permettent le libre développement social, et donc le passage naturel d'une classe à l'autre . 10. Qui se bat pour l'Union Européenne favorise la paix mondiale". Les Espérantistes, des utopistes ? L'Utopie est la Réalité de demain !

*Notre spécialiste en documents historiques, Jean Amouroux, trouvera certainement d'autres documents intéressants sur le sujet ... Sur ce thème, détails supplémentaires sur le site de Sat-Amikaro*



Eŭropanoj!

1. Spite al ĉio: kredu je Eŭropo-Unio.
2. Ĉe landaj balotoj voĉdonu nur je la favoro de tiu partio, kiu batalas por kreado de unueca ekonomi-teritorio eŭropa.
3. Propagandu kreadon de Komuna Parlamento de l'eŭropaj naciaj parlamentoj.
4. Postulu starigon de komuna Eŭropa Armeo kaj la enkondukon de unueca Eŭropa Valuto.
5. Postulu aŭtonomiojn por la ŝtatoj, provincoj kaj urboj en Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo.
6. Lernu „eŭrope".
7. Respektu ankaŭ la naciecon de aliaj.
8. Batalu por la malburokratigo (malŝtatigo kaj malmonopoligo) de l' ekonomio.
9. Batalu por leĝoj kaj institucioj, kiuj ebligas liberan socian kreskadon, do naturan klaso-ŝanĝon.
10. Kiu batalas por Eŭropa-Unuiĝo, akcelas la mond-pacon.

Eldonis: UŜE-EŬO, Timişoara, Str. Lonovici 1 (Rumanio-Banato).

POŜTKARTO

13 SEP 1934

S-ro René de Lafarte
4, Villa de Orlean
Fontenay-sous-Bois
(Seine) - FRANCIA

*Recepto de nova jaro*

Elektu 12 maturajn monatojn; kontrolu, ke en ili ne plu restu iu ajn ero pri malamikemo, malpardonemo, malamo kaj ĵaluzo .

Tiujn monatojn plene purigu ankaŭ el ĉiaj restantaj aĉ-pensoj .

Forigu ĉiujn spurojn de et-animeco .

Partigu tiujn monatojn en 30 aŭ 31 egalajn pecojn .

Ne provu kun-aranĝi ĉiujn pecojn samtempe, sed preparu unu tagon jene :

En ĉiun tagon enmetu egalajn partojn da fido, pacienco, kuraĝo, laboro, espero, fideleco, bonkoro, ripozo, preĝado kaj meditado . Aldonu proksimume tekuleron da bonaj intencoj, iom da plezuro, pinĉaĵon da frenezeco, etan disŝutaĵon da ludado kaj taso-plenon da bona humoro .



Verŝu amon en la preparaĵon kaj vigle miksu .

Servu kun trankvilo, malegoismo kaj ĝojo .

Benitan kaj Feliĉigan Novan Jaron al ĉiuj viaj parencoj kaj amikoj !

## DISTRA PAĜO

### KRUCVORTOJ

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| I | | | | | | | | | | |
| II | | | | | | | | | | |
| III | | | | | | ■ | | ■ | | |
| IV | | | | ■ | | | | | ■ | |
| V | | | | | | | | | | |
| VI | | | | | ■ | | | | | |
| VII | | | | ■ | | | | | | |
| VIII | | | | | | | ■ | | | |
| IX | | ■ | | | | | | | ■ | |
| X | | | | | | | | ■ | | |

Solvoj de la 158-a

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| I | K | O | M | P | L | i | M | E | N | T |
| II | O | D | E | ■ | i | ■ | A | R | i | E |
| III | M | i | L | i | T | A | R | i | S | M |
| IV | P | L | O | R | E | M | A | ■ | i | P |
| V | L | ■ | P | A | R | A | B | O | L | E |
| VI | E | K | E | ■ | A | R | U | M | ■ | R |
| VII | (i) | M | P | E | R | A | T | i | V | A |
| VIII | O | D | ■ | M | A | N | i | K | E | T |
| IX | R | ■ | V | O | R | T | ■ | R | S | U |
| X | i | P | E | K | O | ■ | P. | A | T | R |

Eraro = 1-VII

HORIZONTALE

I) - Vera mondan(o).
II) - Kurentproduktil(o).
III) - Dekoracie / Pronomo.
IV) - Duontomano / Materiec(o).
V) - Politikul(o).
VI) - Kolor(o) / Insulo.
VII) - Akvar(o) / Kirle flu(i).
VIII) - Des pli lamade / E-a asocio.
IX) - Kaùz(o).
X) - Laùnacia numeral(o) / Lud(o).

s : sone

VERTIKALE

1) - Soldatokvartal(o).
2) - Antikva jarkvar(o).
3) - Signosistem(o).
4) - Rabobest(o) / s : Bleko / Prefikso.
5) - Helena princ(o) / Grekdevena prefikso.
6) - Duonpuno / Bruoj kaj movoj .
7) - Dezertaj loĝant(oj) / s : Parto.
8) - s : Patriarko / Kabriolet(o).
9) - Kvanto / Kuir(i).
10) - Reĝo el Eleùziso.

BOPARO

************************************************************************************

### SOLVOJ DE LA MATEMATIKAJ PROBLEMOJ:

**Ĉe la bakisto :** 2 bulkoj + 1 lunarko = 20 F (iama valuto) 1 bulko + 2 lunarkoj = 22F . Se mi aldonas la du aĉetojn : 3 bulkoj + 3 lunarkoj = 2O F + 22 F = 42 F . Por triono de la tuto, do 1 bulko kaj unu lunarko : 42F : 3 = 14F (Algebro ne bezonata !)
**TGV** : 278 metroj en 2 sekundoj kaj duono reprezentas horan rapidecon de 278 m : 2,5 sec x3600 sec (en une horo) = 400 000 m = 400 km por la du trajnoj . La rapideco de unu trajno estas 200 km/h .
**Geografio** : Pli ol 14 malriĉuloj konsumas tiom, kiom unu riĉulo . Pripensinde !

### NOVAJ ENIGMOJ :

**Ĝirafopopotarino :** En mia zoologia ĝardeno estas nur ĝirafoj, hipopotamoj kaj rinoceroj . Inter ili pli ol 7 ne estas ĝirafoj, malpli ol 8 ne estas hipopotamoj kaj maksimume 5 ne estas rinoceroj . Minimume estas 2 ĝirafoj kaj maksimume estas 6 hipopotamoj . Kiom da entute ? Kiom de ĉiu speco ?
**La Mondo :** Kvar kvinonoj de la terglobo konsistas el oceanoj kaj du trionoj de la teroj estas en la norda hemisfero . Kiu estas la proporcio de la oceanoj en la suda hemisfero (procente) ?

************************************************************************************

### ANEKDOTO :

**Pruntado :** La sonorilo sonoras . La edzo diras
-"Certe estas la najbaro, kiu petos ion prunte . Tio ĝenas min, ĉefe ĉar li neniam redonas la pruntitaĵojn . Ĉifoje mi nenion pruntos" .
Kolere, li malfermas la pordon :
-"Bonan matenon !", diras la najbaro. "Mi dezirus scii, ĉu vi posttagmeze bezonos la motorciklon ?"
-"Certe, ĉar mi devos forvojaĝi kun mia edzino", respondas la edzo .
-"Bonege ! Divenite ! Trafe ! Do, vi lasos hejme la aùtomobilon.Ĉu vi pruntos ĝin al mi?

El bulteno de la Albana E°-Instituto



*La venonta numero de SFS aperos komence de aprilo, antaù la federacia kongreso . La __limdato__ por viaj kontribuoj estas la __27a de marto__ . Adreso : J. Hénin Beauregard - Route de Montcayroux 48500 La Canourgue Tel/Fakse : 04 66 32 86 36 Rete : <Jean.Henin@wanadoo.fr>*

